
# JEN BULTENO

V-no 9

ELDONATA DE LA
JUNULARO ESPERANTISTA DE NORD-AMERIKO



Majo 1963

JEN BULTENO DE LA JUNULARO ESPERANTISTA DE NORD-AMERIKO

SENDU KOTIZOJN AL: STANLEY COHEN, 16 LONG AVE., ALLSTON, MASS.; REDAKCIAJN AFEROJN AL: ALLAN E. FINEBERG, 76 17TH AVENUE, PATERSON, N. J.; ĜENERALAJOJN AL: RICHARD KOLLIN, 30 AVENUE B, NEW YORK 9, N. Y. -- JARABONO: $1.00 AŬ EGALVALORO.

JEN ESTRARO:

| | |
|---|---|
| RICHARD P. KOLLIN | SEKRETARIO |
| ALLAN E. FINEBERG | REDAKTORO |
| STANLEY COHEN | KASISTO |
| JOHN F. KOOISTRA | KOMISIITO PRI UNIVERSITATANOJ |
| HUMPHREY TONKIN | KOMISIITO PRI EKSTERLANDAJ AFEROJ |
| JONATHAN POOL | KOMISIITO PRI VARBADO |

$ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $

ĈU VI DEZIRAS GAJNI MONON DUM VIAJ LIBERAJ MINUTOJ, SEN RISKO?

KAJ SAMTEMPE DISPONI MODERNAN INFORMFOLION, SEN PAGO ?

SE JES, RIGARDU NIAN PROPONON! :

"A WORD ABOUT ESPERANTO" ESTAS NOVA, POPULAR-NIVELA INFORMFOLIO POR ĜENERALA DISDONADO. KROM LA INFORMO, ĜI PORTAS MENDILON POR LA HARVARD ESPERANTO CLUB CORRESPONDENCE COURSE, KAJ LA JEN ESPERANTO SELF-INSTRUCTION KIT. NI SENDOS AL VI, ABSOLUTE SENPAGE, KVANTON DE LA INFORMILOJ, KAJ VI DISDONOS ILIN AL INTERESITOJ PRI ESPERANTO. POR ĈIU PERSONO, KIU MENDOS LA KORESPONDAN KURSON AU LA ESPERANTO-KOMPLETON, NI PAGOS AL VI 10% DE LA KURS-KOTIZO.

AGU TUJ HODIAŬ! VI GAJNOS MONON, VI GAJNOS INFORMILOJN, KAJ VI NE POVOS PERDI !

SENDU VIAJN NOMON KAJ ADRESON AL:

HARVARD ESPERANTO-KLUBO, FAKO W
QUINCY HOUSE, BOX 8
HARVARD UNIVERSITY
CAMBRIDGE 38, MASSACHUSETTS

$ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $

## Jen demandas — kandidatoj respondas

Antaŭ kelkaj semajnoj, ni sendis demandaron al ĉiuj ELNA-postenaj kandidatoj demandante pri iliaj starpunktoj. Jen la demandoj kaj la respondoj:

1. Ĉu vi intencas, precipe dum la jaro de la junularo, pli emfazi la rolon de la junularo kaj ĝia organizo, JEN, en la Esperanto-Movado?

Armin F. Doneis, Sr., kandidato por ELNA Prezidanto: "Jes."

John L. Lewine, kandidato por ELNA Prezidanto: "Mi respondas jese."

David B. Richardson, kandidato por ELNA Prezidanto: "Nepre jes."

Francis Helmuth, kandidato por ELNA Vic-Prezidanto: (ne respondis)

Roan Orloff Stone, kandidato por ELNA Vic-Prezidanto: "Jes."

William W. Glenny, kandidato por ELNA Estrarano: (ne respondis)

Elwyn C. Pollock, kandidato por ELNA Estrarano: "Ĉiam mi emfazas la rolon de la junularo; precipe tio necesas por ĉiuj el ni en la nuntempa Esperanto Movado, kun speciala rilato al la JEN Movado."

Julie L. Regal, kandidato por ELNA Estrarano: (ne respondis)

Robert J. Runser, kandidato por ELNA Estrarano: (ne respondis)

Catherine (Mrs. William H.) Schulze, kandidato por ELNA Estrarano: "Kiel vi scias mi multe interesiĝas pri la junularo, pri JEN kaj subtenas viajn entreprenojn ageme kaj elkore."

Jonathan R. Pool, enskriba kandidato por ELNA Estrarano: "Absolute jes. Mi volas doni al la junularo, per JEN, pli fortan kaj pli aŭskultatan voĉon ĉie en nia movado."

2. Ĉu vi aprobas ke, kie ajn aperas la membro-kotizon de ELNA, oni ankaŭ aperigu la jam oficialan specialan kotizon por studentoj?

Doneis: "Jes."

Lewine: "Jes."

Richardson: "Jes, tio jam efektiviĝas, per la nova aliĝilo, nun presata."

Helmuth: (ne respondis)

Stone: "Jes."

GLENNY: (NE RESPONDIS)

POLLOCK: "SE ELNA HAVAS SPECIALAN KOTIZON POR STUDENTOJ, MI CERTE APROBAS, KE ĜI APERIGU TIUN EN LA REVUO KUNE KUN LA MEMBRO-KOTIZO."

REGAL: (NE RESPONDIS)

RUNSER: (NE RESPONDIS)

SCHULZE: "JES, PRI TIO MI PETIS KAJ EĈ ANTAŬ JAROJ PETIS ĈU ESTIS STUDENT-KOTIZO ĈAR MI NENIAM VIDIS TION. VI VIDAS LA REZULTON SUR LA ENFERMITA ALIĜILO DE ELNA."

POOL: "JES. NI NEPRE MONTRU AMBAŬ KOTIZOJN EN LA REVUO, INFORM-FOLIOJ, KTP."

> 3. ĈU VI APROBAS, KE ONI PRESU ĜISDATAN ELDONON DE LA STATUTO DE ELNA KAJ DISDONU ĜIN AL ĈIU MEMBRO DE ELNA?

DONEIS: "JAM FARATA."

LEWINE: "JES."

RICHARDSON: "JES, TIO ANKAŬ EFEKTIVIĜAS JAM NUN."

HELMUTH: (NE RESPONDIS)

STONE: "JES."

GLENNY: (NE RESPONDIS)

POLLOCK: "KONSIDERANTE LA STATUTON DE ELNA KAJ LA KOSTON DE "ĜISDATA ELDONO,' MI IOMETE DUBAS, ĈU VERE VALORAS AL NI ĜENERALE. EBLE UNU EL DEK TRARIGARDOS, UNU EL 50 LEGOS, KAJ UNU EL CENT ĜIN STUDOS! ĈU NE PLI BONE DO — ALMENAŬ NUNTEMPE — UZU LA MONON (SE TIOM DA MONO DISPONAS AL NI) POR PLIBONIGI LA ELNA REVUON?"

REGAL: (NE RESPONDIS)

RUNSER: (NE RESPONDIS)

SCHULZE: "LAŬ VIAJ DISKUTOJ EN BOSTON, ŜAJNAS KE VI PROPONAS KE ONI POVUS FACILE FARI TION PER APERIGO DE ŜANĜOJ EN LA REVUO. ĈU MI AŬDIS KOREKTE? MI SUBTENAS LA IDEON."

POOL: "KAJ LA STATUTO KAJ LA DEMOKRATECO POSTULAS KE ĈIU MEMBRO HAVU AKTUALAN EKZEMPLERON DE LA STATUTO. NI TUJ AGU PRI TIO!"

> 4. KIEL VI OPINIAS PRI LA OFTECO DE LA ELNA-REVUO, LA LINGVO (ESPERANTO AU ANGLA AŬ AMBAU), LA ENHAVO, KAJ LA UZO DE LA REVUO KIEL VARBILO AŬ INFORMILO POR NE-ESPERANTISTOJ?

DONEIS: "JAM FINDECIDITA POR LA VENONTA JARO FARE DE NIA ESTRARA KOMITATO JENE: OK AŬ DEK NUMEROJ DE LA REVUO APEROS DUM 1963 LAŬ LA FINANCA EBLO; PLEJPARTE EN ESPERANTO, SED KUN MAKSIMUME 4 PAĜOJ DA ANGLA TEKSTO; LA REVUO ESTAS MULTE TRO ALTKOSTA POR UZO KIEL PROPAGANDILO AMASA; ANSTATAŬE NI ELDONOS VARBFOLIOJN & INFORMILOJN APARTAJN FLANKE DE NIA INFORMA SERVO KIU DISPONOS PRI ĈIRKAŬ $400 PO JARO POR INFORMILOJ ANGLALINGVAJ KIUJ ESTAS PLI EKONOMIE UZEBLAJ. NIAJ FINANCOJ NE NUN PERMESAS AL NI ELDONI IMPONAN REVUON KIU BONIMPRESUS LA NEESPERANTISTAN PUBLIKON. DO FALDFOLIOJ DEVOS KONTENTIGI NIN ĜIS KIAM NI ESTOS KONSIDERINDE PLI STABILAJ FINANCE. TIUJ ĈI KONKLUDOJ REZULTIS EL LONGA DISKUTO KUN ĈIUJ HAVEBLAJ CIFEROJ & FAKTOJ."

LEWINE: "MI NE HAVAS OPINION ĈU LA ELNA-REVUO ESTU MONATA AŬ DUMONATA. ANTAŬ OL DONI MIAN OPINION MI DEVAS INFORMI MIN PRI SENDOKOSTOJ K.T.P. MI OPINIAS KE LA REVUO DEVAS ENHAVI ARTIKOLOJN EN ANGLA LINGVO KAJ EN ESPERANTO. ĜI DEVAS SERVI KAJ POR SCIIGI ESP-ISTOJN PRI NIA MOVADO, KAJ ENHAVI LITERATURAĴOJN EN ESP-O KAJ ARTIKOLOJN PRI ESP-O EN ANGLA LINGVO POR VARBI NE-ESPERANTISTOJN EN NIAN MOVADON."

RICHARDSON: "MI PERSONE PREFERUS TUTESPERANTAN, MONATAN REVUON. MI KONSIDERAS, KE ALIAJ SPECOJ DE INFORMILOJ -- FOLIOJ, BROŜUROJ, KTP. -- PLI TAŬGAS POR VARBAJ CELOJ, OL LA REVUO, KIU DEVUS SERVI LA INTERESOJN DE LA ESPERANTISTOJ MEM. SED ĈAR MULTAJ MEMBROJ KAJ OFICISTOJ OPINIAS, KE LA REVUO DEVUS ENHAVI ANKAŬ ANGLALINGVAĴOJN, MI ESTAS KONTENTA PRI LA NUNA KOMPROMISO, LAŬ KIU UNU INFORMA ARTIKOLO KAJ KELKAJ SELEKTITAJ RAPORTOJ APERU EN LA ANGLA. POSTE, KIAM NI ESTOS SUFIĈE FORTAJ POR ELDONI VERE IMPONAN GAZETON, VENDEBLAN EN LA BUTIKOJ INTER LA PUBLIKO, TIAM NI CERTE METU TAŬGAN INFORMAN MATERIALON ANGLALINGVAN EN ĜIN."

HELMUTH: (NE RESPONDIS)

STONE: "LA OFTECO DE LA REVUO ESTAS SUFIĈE BONA NUN, KVANKAM MI ŜATUS VIDI GIN ĈIUMONATE. MI PREFERAS, KE ĜI RESTU NUR POR GESAMIDEANOJ, KAJ EN ESPERANTO. LA ENHAVO ESTAS SUFIĈE BONA POR KRESKANTA LIGO; ESPEREBLE ĜI PLIBONIĜOS LAŬ LA KRESKADO DE ELNA. SED MI ŜATUS VIDI EN ĜI APARTAN BULTENON POR NE-ESPERANTISTOJ."

GLENNY: (NE RESPONDIS)

POLLOCK: "LA ELNA REVUO DAŬRE PLIBONIĜAS; LA MARTO-APRILO NUMERO VERE BELASPEKTAS. LA ENHAVO: BONEGA. KIEL VARBILO - 'ESPERANTE, ANGLE AŬ AMBAŬ,' SAME EFEKTIVIGAS, ĈAR IOKAZE, ONI NE LEGAS, SED NUR RIGARDAS, KAJ LA TRARIGARDO TRA LA PLEJLASTA TUTE KONTENTIGAS. MI PERSONE NE POVAS SUGESTI KIAMANIERE ĜIN PLIBONIGI, SE NE NI POVOS ELSPEZI SUFIĈE DA MONO POR ĈIUMONATA ANSTATAŬ ĈIU DUMONATA REVUO!"

REGAL: (NE RESPONDIS)

RUNSER: (NE RESPONDIS)

SCHULZE: "MI DEZIRAS KE LA ELNA REVUO APERU ALMENAŬ 10FOJE ĈIUJARE KAJ BALOTIS TIEL. MI DEZIRAS KE CIAM ESTU KELKAJ PAĜOJ (2 AŬ 4) ANGLALINGVE PRO LA KIALOJ CITITAJ EN PARAGRAFO A EN LA KUNMETITA LETERO. AL TIO MI ALDONAS KE NOVAJ STUDENTOJ KIUJ ESTAS TRO 'VERDAJ' AU 'NEVERDAJ' POR LEGI MULTE EN LA ESP. PARTO, POVAS LEGI INTERESAN NOVAJON EN LA ANGLA PARTO POR HAVI FREŜAN INFORMON POR PROPAGANDI AL LA AMIKOJ. VI EBLE DIRAS KE NI DEVAS NE DORLOTI LA MALLABOREMULOJN KAJ MI MEM ŜATUS PAFI ILIN SED TIAJ ILI ESTAS KAJ NI DEVAS ENIRI ILIAJN PORDOJN POR ELTIRI ILIN TRA NIAJ. KAJ MI TROVAS KE MI POVAS PAROLI PRI LA FLAGO SUR MT. KILIMANĜARO KAJ LA NOVA PREZIDANTO DE LA UN KIEL ESPERANTISTO, KTP KTP KTP ĜIS MI ESTAS BLUVIZAGE. SED SE ILI MEM LEGAS LA SAMAN AFERON ILI DONAS AL MI TIUN MONUMENTON NOVAJON KAJ ANKAŬ AL LA AMIKOJ KUN TIOM DA ENTUZIASMO KION VI EC NE POVUS IMAGI."

POOL: "ĈIO DEPENDAS DE LA CELO DE LA REVUO. LA ELDONAJOJ DE LA LIGO POVAS LUDI TRI ROLOJN: I. EN-MOVADA INFORMILO KAJ LIGILO, 2. GENERALA LEGAJO, KAJ 3. VARBILO. KROME, LA LIGO KAJ TIES ELDONAJOJ POVAS SERVI AŬ AL NUR USONO AŬ AL TUTA NORDA AMERIKO. MI NE NUN HAVAS POLURITAN RECEPTON POR SOLVI ĈI TIUJN PROBLEMOJN; SED, SE MI ELEKTIĜOS, MI INTENCAS INSTIGI DISKUTOJN INTERNE DE ELNA, KAJ INTER ELNA KAJ LA KANADA KAJ MEKSIKIA LAND-ASOCIOJ, POR KE NI FINE DIFINU LA CELOJN DE LA REVUO. TIAM NI POVOS LAUE DECIDI PRI LA OFTO, LA LINGVO(J), LA ENHAVO, KAJ LA UZOJ. ANTAUE, ŜAJNAS AL MI EVIDENTE, KE VARBILO ESTU UNU-NACIA, ĜENERALA LEGAJO ESTU PREFERE INTERNACIA, KAJ EN-MOVADAJ INFORMILOJ HAVU LA SAMAN GEOGRAFIAN STRUKTURON KIEL LA MOVADO MEM."

5. KIA, EN VIA OPINIO, ESTU LA RILATOJ INTER ELNA KAJ LA DIVERSAJ USONAJ ESPERANTAJ LIBRO-SERVOJ?


DONEIS: "NI NE VIDAS IAN URĜON HAVI IAN AJN OFICIALAN LIBROSERVON, KAJ NE ESTAS IA REGULO AŬ LEGO KIU BEZONUS MODIFON POR ĈESI LA KUTIMON KIU NATURE ELKRESKIS EL LA SITUACIO KIU REGIS POST LA SKISMO DE EANA. MI FAVORAS KE ELNA METU ĈIUJN LIBROSERVOJN SUR EGALA BAZO, SEN SPECIALA FAVORO AL IU AJN."

LEWINE: "ESTAS DEZIRINDE KE ELNA NE HAVU LIBROSERVON OFICIALAN. ONI DEVAS SCIIGI ESP-ISTOJN KAJ ALIAJN INTERESULOJN PRI LIBROSERVOJ SED NE OFICIALIGI IUN AJN SERVON."

RICHARDSON: ELNA DEVUS SUBTENI ĈIUJN NEUTRALAJN LIBRO-SERVOJN, SED NI DEVUS KLOPODI ANKAU INTERESI KIEL EBLE PLEJ MULTAJN KOMERCAJN LIBROVENDANTOJN STOKI ESPERANTAJN LIBROJN. TIO ALDONOS AL NIA PRESTIĜO, KAJ DONOS AL LA LIBROVENDISTOJ MOTIVON POR HELPI DISVASTIGI ESPERANTON."

HELMUTH: (NE RESPONDIS)

STONE: "ELNA HAVAS SIAN BONEGAN LIBROSERVON EN MIDDLETON, WISCONSIN. ESTUS EBLE DEZIRINDE RILATI KUN LA ALIAJ LIBROSERVOJ, SIMILE AL UEA, KIU HAVAS SIAN LIBROSERVON, TAMEN RILATAS KUN ĈIUJ JE CERTA FINANCA BAZO."



ĈIUTAGAJ DETALETOJ

GLENNY: (NE RESPONDIS)

POLLOCK: "PRI LA ESPERANTO LIBRO-SERVOJ, JE LA MOMENTO MI NE POVAS PAROLI; VIDU MIAN ARTIKOLON PRI TIO EN BALDAŬA NUMERO DE LA ELNA REVUO."

REGAL: (NE RESPONDIS)

RUNSER: (NE RESPONDIS)

SCHULZE: "LIBRO-SERVOJ – ĈIUJ NEOFICIALAJ, KAJ ĈIU PAGU ION POR REVU-REKLAMADO."

POOL: "ELNA TUTE NE BEZONAS LIBROSERVON OFICIALAN. EKZISTAS PLURAJ LIBROSERVOJ EN USONO. ELNA DONU AL ILI ĈIUJ EGALAN REKLAMSPACON EN LA REVUO. IA OFICIALA KUNLIGO KROM TIO ESTAS SUPERFLUA KAJ NEJUSTA."

| |
|---|
| 6. KION VI OPINIAS PRI LA NEŬTRALECO DE ELNA KAJ ĜIAJ OFICIALAJ PERANTOJ? |

DONEIS: "MIAOPINIE ELNA ESTAS ALMENAŬ TIOM NEŬTRALA KIOM ESTAS UEA. UEA SUBTENAS & INTIME KUNLABORAS KUN UN–UNESCO, KAJ TIU FAKTO POVAS OFENDI PERSONOJN KIUJ PRO DIVERSAJ BONAJ AŬ MALVALIDAJ KIALOJ NE SIMPATIAS KUN UNO. POR ESTI VERE NEŬTRALA ELNA & UEA DEVUS ESTI SAME NEAKTIVAJ KAJ MORALE INDIFERENTAJ KIEL LA MORTINTOJ, KAJ EĈ INTER MORTINTOJ JA POVAS REGI DISPUTO ĈU LA INFERO AŬ LA ĈIELO ESTAS PREFERINDA. DO, KIU POVAS ESTI 100% NEŬTRALA? NEUTRALECO VERE ESTAS RELATIVA AFERO KIU VARIAS KUN LA PERSONA VIDPUNKTO."

LEWINE: "ELNA NEPRE DEVAS ESTI ORGANIZAĴO NEŬTRALA EN LA ESP–MONDO. ĜIA CELO DEVAS ESTI PROPAGANDI NUR ESP–ON. PROPAGANDI ALIAJN CELOJN PERE DE ESP–O ESTAS LA CELO DE LA DIVERSAJ FAKORGANIZAĴOJ EN ESPERANTUJO."

RICHARDSON: "LAŬ LA KONSTITUCIO, ELNA ESTAS KAJ ĈIAM DEVAS ESTI NEŬTRALA. LA NEŬTRALECO ESTAS TRE KARA AL NI. KOMPRENEBLE, TIO VALIDAS ANKAŬ POR NIAJ OFICIALAJ PERANTOJ."

HELMUTH: (NE RESPONDIS)

STONE: "MI ĈIAM ESPEROS, KE ELNA ESTU TUTE NEŬTRALA, KAJ KE LA PERANTOJ DE ELNA SUBTENU TIUN NEŬTRALECON."

GLENNY: (NE RESPONDIS)

POLLOCK: "LA NEŬTRALECO DE ELNA KAJ 'ĜIAJ OFICIALAJ PERANTOJ,' KIEL EN IU AJN EVOLUIĜA MOVADO, KIU VOLAS REALIGI PRINCIPAROJN DE IDEALA NATURO, DEVAS RESTI ABSOLUTA POR SIA PROPRA BONO; ESPERANTO EKZ., CELAS LA MONDON, KAJ ĈAR ESPERANTISTOJ TROVIĜAS EN ĈIUJ MONDPARTOJ, REPRESENTANTAJ ĈIUJN RELIGIOJN, KUTIMOJN, MOROJN, KTP., NEŬTRALECO FARIĜAS POSTULATA DEVO AL LA MEMBRARO, KIUJ MEM ESTAS TUTE DIVERSAJ EN LA PROPRA KREDARO, PLEZUROJ, MANIERO DE VIVADO, MANĜADO, KTP, KTP!"

REGAL: (NE RESPONDIS)

RUNSER: (NE RESPONDIS)

SCHULZE: "EN 3 VI DEMANDIS PRI KONSTITUCIOJ KAJ ĈITIE MI DIROS KE MI MEM NE OKUPAS PRI KONSTITUCIOJ KIEL LA VIROJ – TAMEN MI TAKSAS ILIN GRAVEGAJ. SED LAŬ MIA OPINIO LA NURA GRAVA, MI DEVAS DIRI LA SOLA GRAVA PARTO DE LA KONSTITUCIO (NACIE AU LOKE, KAJ KOMPRENEBLE INTERNACIE) ESTU LA DEKLARO PRI NEŬTRALECO."

POOL: "KAJ LA LIGO KAJ TIES POSTENULOJ DEVAS RESTI SEVERE NEŬTRALAJ ĈE SIAJ OFICIALAJ AGADOJ. SE IU PERANTO, EKZEMPLE LA ESPERANTO LEAGUE BOOK SERVICE, KUNLIGAS SIAN OFICON KUN IU POLITIKA AU ALIA NENEŬTRALA IDEO, ELNA DEVAS TUJ KAJ SENHEZITE MALOFICIALIGI LIN."

| |
|---|
| 7. KIEL VI OPINIAS, KE ONI POVUS ALDONI PLI DA PRESTIĜO AL LA ESPERANTO-MOVADO INTER NE-ESPERANTISTOJ? |

DONEIS: "NI POVAS PLIALTIGI LA PRESTIĜON DE ELNA & ESPERANTO ANTAŬ LA ĜENERALA PUBLIKO SE NI RIFUZOS ESTI HARFENDEMULOJ PRI POLITIKO, PRI GRAMATIKO KAJ ATA-ITA, PRI NEŬTRALECO. DO, MALLONGE, PER PLI DA TOLEREMO & PACIENCO!"

LEWINE: "EN EUROPO KAJ EN AZIO ESP-O ĜUAS GRANDAN PRESTIĜON INTER RONDOJ INTELEKTULARAJ. TIO REZULTAS EL LA FAKTO KE LA ĈEFOJ DE L' ESP-MOVADO TIEA ESTAS GRAVAJ PERSONOJ PRESTIĜOZAJ KAJ PRO LA VALORO PRAKTIKA DE ESP-O KIUN EVIDENTIGAS LA GRANDAJ KONGRESOJ UNIVERSALAJ, LANDAJ, FAKAJ, K.T.P., LA ELDONADO SENĈESA DE VERKOJ ALTVALORAJ LITERATURAJ KAJ SCIENCAJ, LA UTILIGO DE ESP-O DE GRUPOJ NE-ESPERANTISTAJ, KIEL FERIOJ INTERNACIAJ, KOMPANIOJ AERTRANSPORTAJ KAJ CETERAJ. EN USONO NI DEVAS DISKONIGI ESP-ON ĈE LA PLEJ GRAVAJ INSTANCOJ, KAJ REGISTRARAJ KAJ PRIVATAJ, KAJ MONTRI KE ESP-O POVAS ESTI UTILA AL NE-ESPERANTISTOJ."

RICHARDSON: (VIDU RESPONDON AL LA DEKA DEMANDO)

HELMUTH: (NE RESPONDIS)

STONE: "KIEL EBLE PLEJ MULTE PRELEGI KAJ SKRIBI PRI ESPERANTO, EN LA ĴURNALOJ, EN LERNEJOJ KAJ UNIVERSITATOJ, ĈE DIVERSAJ KLUBOJ KAJ SOCIETOJ – FAKTE, UZI ĈIUN OKAZON POR DISKONIGI LA INTERNAN IDEON DE ESPERANTO; KLARIGI AL LA AŬSKULTANTOJ KAJ LEGANTOJ PRI LA KONSTRUO, PRI LA CELO, PRI LA PROFITOJ, KAJ PRI PERSONAJ TRAVIVAĴOJ PERE DE ESPERANTO. NENIAM ĈESI EN TIU LABORO."

GLENNY: (NE RESPONDIS)

POLLOCK: "POR 'ALDONI PLI DA PRESTIĜO AL LA ESPERANTO-MOVADO INTER NE-ESPERANTISTOJ,' LERNU ESPERANTON! PLI MI NE POVAS DIRI."

REGAL: (NE RESPONDIS)

RUNSER: (NE RESPONDIS)

SCHULZE: "PER PLI PROFESIA MANIERO, PLI DIGNA, NE TRO KOMPLEZA. NE TRO VOLONTE HELPU KAJ DONU SED IGU KE ONI PETU HELPON DE NI AŬ INFORMON, KTP. NI DEVAS FUNKCII DECE INTER RESPEKTITAJ GRUPOJ KIEL LA LERNEJOJ, PTA (UGH) STUDENT-INTERNACIAJ GRUPOJ, SCIENCAJ GRUPOJ (KIEL ASTRONOMOJ) KTP. MI NE KLOPODOS VERKI VERAN LISTON."

POOL: "LA PLEJ GRAVA BARO AL PLI ALTA PRESTIGO ESTAS LA FRENEZECO, KIU DISTINGIGAS LA ESPERANTO-MOVADON DE ALIAJ MOVADOJ. KROM TIO, NIA KELKLOKA NENEŬTRALECO FORTIMIGAS HOMOJN. NI OFTE REKOMENDAS ESPERANTON KIEL PRAKTIKAN, KIE ĜI ESTAS TUTE MALPRAKTIKA (EKZEMPLE CE LA PAC-KORPUSO). NI UZAS AĈ-ASPEKTAJN, ERAR-PLENAJN INFORMILOJN. NI EMFAZAS LA PLEJ RIDINDAJN VENKETOJN (ONI LEGAS PLI PRI LA NOMBRO DA STRATOJ NOMITAJ "ESPERANTO" OL PRI LA NOMBRO DA PERSONOJ KIUJ PAROLAS ĜIN). NI DEVAS KOREKTI TIUJN DIFEKTOJN. PRECIPE, NI DEVAS INFORMADI KUN MENSA SANO, ANTAUVIDANTE LA REAGOJN DE LA PUBLIKO."

| |
|---|
| 8. ĈU VI HAVAS IAN AJN IDEON PRI KIAMANIERE ONI POVAS PLIBONIGI KAJ PLIGRANDIGI LA ELNA ORGANIZON? |

DONEIS: "PER SERIOZA LABORO KAJ MALPLI DA DEBATEMO AU POLEMIKEMO. NI SPARU NIAJN FORTOJN DE TIAJ TEMPORABAJ NEPRODUKTIVAJ DISTRAĴOJ KAJ KONCENTRIGU NIAJN FORTOJN & ATENTON PER UNUIGITA FRONTO AL LA INDIFERENTA PUBLIKO."

LEWINE: "ELNA DEVAS SERVI KIEL LA LIGILO DE ĈIUJ ESP-ORGANIZAĴOJ EN USONO, CU LOKAJ GRUPOJ, FAKAJ ORGANIZAĴOJ, ESP-KLASOJ KAJ ANKAU IZOLULOJ. ELNA ANKAU DEVAS REPREZENTI LA ESP-ISTARON USONAN RILATE LA MOVADON INTERNACIAN. KIEL LANDORGANIZAĴO LIGATA LA UEA ĜI DEVAS SUBTENI TIES KLOPODOJN EN USONO KAJ KANADO KAJ SCIIGI AL UEA LA IDEOJN DE ESP-ISTOJ EN NORD-AMERIKO."

RICHARDSON: (VIDU RESPONDON AL LA DEKA DEMANDO)

HELMUTH: (NE RESPONDIS)

STONE: "JES, MI HAVAS IDEOJN, SED TIUJ IDEOJ POSTULAS MONON, KIUN NI NE HAVAS. UNU EL MIAJ IDEOJ ESTAS CENTRA OFICEJO, KUN KONSTANTA LABORANTARO, SIMILE AL LA UEA OFICEJO. NI ESTAS TRO DISAJ NUN POR BONAJ REZULTOJ."

GLENNY: (NE RESPONDIS)

POLLOCK: "NUR PER IOMETE PLI DA ENTUZIASMO INTER NI ĈIUJ, EĈ ĈE CIU INDIVIDUO, NI POVAS 'PLIBONIGI KAJ PLIGRANDIGI LA ELNA ORGANIZON.' FACILE POR DIRI, MI SCIAS, SED LA VERO RESTAS, KE NUR KELKAJ INTER NI VERE LABORAS POR PLIBONIGI LA MOVADON; LA CETERAJ ESTAS KONTENTAJ RIPOZI EN LA SUNLUMO."

REGAL: (NE RESPONDIS)

RUNSER: (NE RESPONDIS)

SCHULZE: "MOMENTE PER ELEKTO DE DAVID RICHARDSON KIU JAM DECIDIS KE SE ELEKTITA LI FLANKENPUŜOS ĈION ALIAN KAJ LABOREGOS POR FARI LA NECESAJN TASKOJN POR VERE DIREKTI LA USONAN MOVADON SENHEZITE. SUB VIGLA GVIDANTO MI ANTICIPAS KE LA MEMBRARO KRESKOS, KAJ PLI-GRANDIGITA MEMBRARO SOLVOS MULTAJN PROBLEMOJN SED NE ĈIUJN."

POOL: "SUB PREZIDANTO RICHARDSON ELNA ATINGIS SIAN PLEJ GRANDAN MEMBRONOMBRON, PROKSIMUME 475. TAMEN TIO ANKORAŬ ETAS. POR PLIGRANDIĜI, NI DEVAS IĜI PLI KONATAJ, KAJ TIO POSTULAS, KOMPRENEBLE, VASTAN REKLAMADON. NUNTEMPA REKLAMADO ESTAS GRANDPARTE PER TUTNACIAJ KOMUNIKILOJ, EKZ. GAZETOJ, RADIO, KAJ AMAS-POŜTO, SED ĜIS NUN NIA NACIA REKLAMADO TROVIS LIMON ĈE LA UZADO DE KOVERTAJ GLUMARKOJ. TAMEN, POR EFIKE REKLAMI NI BEZONAS ION REKLAMINDAN; DO UNUE NI FORIGU LA BAROJN AL PLI GRANDA PRESTIĜO (VIDU RESPONDON 7) KAJ SAMTEMPE NI PROPONU AL LA (NATURE EGOISMAJ) HOMOJ ION VALORAN KONTRAŬ LA MEMBROKOTIZO."

9. BONVOLU PRISKRIBI VIAJN KVALIFIKOJN POR LA POSTENO, KIUN VI CELAS.

DONEIS: "VIDU LA LISTON SUR LA DORSO DE LA ELNA BALOTILO. ESPERANTISTO DEPOST 1927; ESTRARANO EN ALTAJ POSTENOJ KAJ EN EANA KAJ EN ELNA DEPOST 1932; PRAKTIKA UZO DE ESPERANTO DUM DU LONGAJ VOJAĜOJ EN 15 LANDOJ; CSEH-INSTRUISTO; PREZIDANTO DE ELNA DE 1957 ĜIS 1960; ESTRARESTRO DE ELNA DE 1960 ĜIS 1963."

LEWINE: "MI ESTAS ESP-ISTO DEPOST KVAR JARDEKOJ, UNUA VIC-PREZIDANTO KAJ DUA PREZIDANTO DE ELNA, PREZIDANTO DE NOV-JORKA ESP-SOCIETO DEPOST 1941, VIC-DELEGITO DE UEA POR INTERŜANĜO DE STUDENTOJ, KAJ REPREZENTANTO DE U.E.A. ĈE EKONOMIA KAJ SCIENCA KONSILANTARO DE UNO. MI ANKAŬ ESTAS MEMBRO DE LA KONSILANTARO PRI STUDADO DE FREMDAJ LINGVOJ ĈE L'OFICEJO PRI PUBLIKA INSTRUADO DE LA URBO NOV-JORKO, SEKRETARIO-GENERALA DE AMERIKA INSTITUTO PRI FRANCLANDO (NOV-JORKO) KAJ KASISTO DE LA KOMITATO INTERNACIA POR FORIGO DE LINGVO-BARILOJ. MI POSEDAS DIPLOMOJN DE LA UNIVERSITATOJ YALE, LA SORBONNE, COLUMBIA, N.Y.U., ETC. KAJ LABORIS KIEL ESPLORISTO POR LINGVISTIKO POR I.A.L.A."

RICHARDSON: "MI FARIĜIS ESPERANTISTO EN 1939 KIEL 13-JARA. EN 1949 MI DIPLOMIĜIS ĈE LA UNIVERSITATO DE WASHINGTON EN SEATTLE, KIE MI STUDIS DIVERSAJN LINGVOJN. KIEL ARMEANO KAJ POSTE KIEL CIVILULO MI VOJAĜIS AL, KAJ EN EŬROPO PLURFOJE, LOĜIS TIE DUM TRI JAROJ KAJ VASTE UTILIGIS NIAN LINGVON TRA MULTAJ LANDOJ. MI ESTAS BONE INFORMITA PRI LA MOVADO KAJ ĜIA HISTORIO. KIEL LIBERA ("FREE-LANCE") VERKISTO DE ARTIKOLOJ POR GAZETOJ KAJ ĴURNALOJ MI KONAS LA PRINCIPOJN DE PUBLIKA INFORMADO. MI ESTAS MEMBRO DE ELNA DE ĜIA FONDIĜO, ESTIS REDAKTORO DE LA REVUO DUM PLURAJ JAROJ, KAJ OFICISTO DE ELNA DUM PLI OL 6 JAROJ. DE 1960 MI ESTAS PREZIDANTO DE LA LIGO. MI OPINIAS, KE ĈI TIUJ SPERTOJ — PLUS MIA SENMORTA AMO AL NIA AFERO — IOM KVALIFIKAS MIN PRETENDI KE MI ESTAS KAPABLA POR LA POSTENO DE PREZIDANTO DE ELNA."

HELMUTH: (NE RESPONDIS)

STONE: "ESPERANTISTINO EKDE 1035; ATESTO PRI INSTRUADO DE EANA; ANKAŬ DE UNIVERSALA LIGO; INSTRUIS MULTAJN KLASOJN TRA LA LANDO; TRADUKIS KELKAJN LIBROJN; SERVIS KIEL ESTRARANINO DE ELNA DUM MULTAJ JAROJ; LABORIS KONSTANTE KUN LIDIA ZAMENHOF DUM ŜIA VIZITO EN USONO EN 1938."

GLENNY: (NE RESPONDIS)

POLLOCK: "MI NE CELAS POSTENON; SE ONI MIN ELEKTOS, MI SERVOS KIEL EBLE PLEJ EFIKE, SED MI ESPERAS, KE IU MULTE PLI TAŬGA ELEKTIĜOS, IU SAĜA EN LA MANIERO DE ESTRECO, IU, KIU MULTE PLI DECAS ALPROKSIMIĜI AL LA MULTAJ PROBLEMOJ, KIUJ POSTULOS SAGACAJN RESPONDOJN! MI ESTAS MUZIKISTO DE PLI OL 40 JAROJ, ŜIPARANGISTO (ŜIPMEKANISTO) DUM ALMENAŬ 15 JAROJ. (DUM DEK EL TIUJ JAROJ MI VERKIS ARTIKOLOJN ĈIUSEMAJNE POR NAVIA JURNALO). MI HAVAS 62 JAROJN KAJ INTENCAS RETIRIĜI EL LA NAVIO ĈIJARE KUN MALGRANDA PENSIO. ESPERANTISTO MI ESTAS DE 1936; RICEVIS "ATESTON PRI KAPABLECO KUN LA RAJTO DE DAŬRA INSTRUADO," LA UNUAN DE MARTO, 1948. PROF. EDWIN L. CLARKE, ESTRO DE LA EKZAMENISTARO, KAJ SEKRETARIO DE EANA G. ALAN CONNOR SUBSKRIBIS LA ATESTON. DU PRELEGOJN (HISTORIAJ DISERVOJ) MI FARIS ANTAŬ LA DU ELNA NACIAJ KONGRESOJ EN SAN DIEGO DUM 1955, 1958; LA LASTA PRI D-RO ALBERT SCHWEITZER. LIBRO-SERVON MI ESTRIS DUFOJE - UNUE DE 1944 GIS 1950, KAJ DUM LA LASTAJ TRI JAROJ, GIN FORLASINTE ANTAŬNELONGE. NI INTENCAS TRANSLOĜIĜI AL LA ALTA KALIFORNIA DEZERTO, CENT MEJLOJN ORIENTE DE LOS ANGELES, KIE MI DAŬRE VERKOS, STUDOS, LABOROS POR ESPERANTO. ANKAŬ SE EBLE, NI IOMETE VETUROS."

REGAL: (NE RESPONDIS)

RUNSER: (NE RESPONDIS)

SCHULZE: "KIEL MEMBRO DE LA ESTRARO MI VIDAS MIAN TASKON SPECIALE TION DE KUNLABORO KUN ALIAJ ESTRARANOJ, KUNLABORO KUN LERNEJOJ, JUNULOJ, LOKAJ KLUBOJ, ORGANIZO DE VOJAĜPLANOJ DE EKSTERLANDAJ SAMIDEANOJ, KONSILANTOJ AL NOVULOJ EN LA MOVADO, KTP KTP."

POOL: "TRIAJARA KOLEGIA STUDENTO ĈE HARVARD COLLEGE. KUNFONDINTO DE LA ESPERANTO-KLUBO DE HARVARD, KAJ ESTRARANO EN TIU KLUBO. ESTRARANO DE JEN. ESTANTE JUNULO (20 JAROJ), MI POVAS REPREZENTI LA KONCERNOJN KAJ IDEOJN DE LA JUNULARO."

10. ĈU VI HAVAS ALIAJN PLANOJN AŬ IDEOJN, KIUJN VI VOLAS EFEKTIVIGI?

DONEIS: "MI NE EMAS KONSTRUI BELAJN AERKASTELOJN; MI NE FARAS BELAJN PROJEKTOJN KIUJ ESTAS PRETER NIA KAPABLO NUN REALIGI. MI KONCERNAS MIN ĈEFE PRI LA AKTUALAJ TASKOJ & PROBLEMOJ,

LA ĈIUTAGAJ SISTEMAJ DETALETOJ, LA DAŬRA INTERKOMUNIKADO & INTERKONSILIGO DE LA ESTRARANOJ. VIZION ĈIU POVAS HAVI; SED LA PLENUMO DE BELA PROJEKTO ESTAS TUTE ALIA AFERO. MI EMAS PLENUMI AKURATE KAJ PRECIZE TIUJN TASKOJN KIUJN NI JAM KOMENCIS. TUTE NE MANKAS PLANOJ, PROJEKTOJ, INTENCOJ & ESPEROJ; MANKAS NUR LA LABORFORTO DE VOLONTULOJ KOMPETENTAJ; MANKAS NUR LA MONRIMEDOJ POR KONKRETIGI LA BELAJN PLANOJN. LA PLANOJ JAM EKZISTAS! NUR MANKAS LA RIMEDOJ!"

EWINE: "MI OPINIAS KE LA ĈEFAJ CELOJ DE ELNA DUM LA VENONTAJ JAROJ ESTAS JENAJ: (1) ALLOGI AL ESP-O LA JUNULARON, ĈAR SEN LA JUNULARO LA MOVADO NENIAM POVAS KRESKI. (2) ATINGI POR ESP-O AGNOSKON ĈE LA PLEJ GRAVAJ INSTANCOJ REGISTARAJ, SCIENCAJ, INTELEKTULARAJ K.T.P. KIEL 'GRAVA FAKTORO LINGVISTIKA KAJ SOCIOLOGIA' (MI CITAS LA VORTOJN DE D-RO. LAPENNA). (3) HELPI ĈIUMANIERE LA LOKAJN GRUPOJN DISKONIGI ESP-ON KAJ VARBI NOVAJN MEMBROJN."

CHARDSON: "NI DEVAS EKHAVI RIMEDOJN POR PLI EFIKE INFORMADI PRI ESP. INTER LA PUBLIKO, INSTIGI ELDONON DE PLI TAŬGAJ LERNILOJ, DONI EFIKAJN HELPOJN AL LOKAJ KLUBOJ KAJ IZOLAJ LABORANTOJ, APOGI LA KAMPANJON 'ESPERANTO EN LA LERNEJOJN,' SERĈI OPORTUNOJN POR INFLUI DIVERSAJN GRANDAJN ORGANIZAJOJN KIES SFEROJ DE AGADO IGAS ILIN APARTE RICEVEMAJ JE NIA AFERO. SED NIAJ NUNAJ ENSPEZOJ KAJ MEMBRONOMBRO ESTAS TRO MALGRANDAJ POR TIA EFIKA LABORO; DO NI DEVAS UNUE PLIFORTIGI ELNA'N POR AKIRI TIAJN RIMEDOJN. TIAL, ANTAŬ UNU JARO NI INICIATIS LAŬ MIA REKOMENDO KAMPANJON POR PLIFORTIGI LA LIGON PER (1) STREĈA PROGRAMO AKIRI NOVAJN MEMBROJN KAJ (2) SAMTEMPA GRADA PLIBONIGO KAJ PLIOFTIGO DE LA REVUO. TIU KAMPANJO DONIS BONAJN REZULTOJN ĜIS NUN, TIEL KE LA LIGO KRESKIS JE PRESKAU 30% DUM LA LASTA DUONA JARO. MI TUTKORE REKOMENDAS DAŬRIGI LA KAMPANJON KUN LA CELO, KE ĈIU SERIOZA ESPERANTISTO EN USONO VOLOS ESTI MEMBRO DE ELNA. MI ANKAŬ JUS REKOMENDIS AL NIA ESTRARO PROGRAMON POR PLUAJ PLIBONIGOJ EN LA REVUO, INKLUZIVE PLIOFTIGON ĜIS 9 NUMEROJ EN 1963 KAJ 11 NUMEROJ EN 1964, PLUS PLIAKTUALIGO DE LA TEKSTOJ (PER PLI RAPIDA LIVERO AL LEGANTOJ). PLIBONIGOJ TEKNIKAJ KAJ EN LA ENHAVO ESTAS JAM PLANITAJ KAJ GRADE EFEKTIVIĜAS. NEPRAS KOMPRENI, KE NUR PER PLIIGO DE NIAJ ENSPEZOJ (PER PLIIGO DE LA MEMBRONOMBRO) NI POVOS FINANCI PLI BONAN REVUON, KAJ SAMTEMPE LA PLI BONA REVUO PLEJE ALTIROS NOVAJN MEMBROJN. KE AMBAŬ PARTOJ DE LA KAMPANJO ANTAŬENIRAS GRADE KAJ SAMTEMPE ESTAS LA KERNO DE MIA PROGRAMO. FINFINE, NI ATINGOS UNUECON KAJ NOMBRAN, KIEL ANKAU FINANCAN FORTON, PER KIU AGADI PLI EFIKE POR ESPERANTO; NI ANKAŬ HAVOS PLI GRANDAJN REZERVOJN DE HOMFORTOJ EL KIUJ ĈERPI ESTONTAJN GVIDANTOJN KAJ LABORANTOJN. TIO NE ESTAS UTOPIA, NEEFEKTIVIGEBLA REVO; NUR NECESAS KE NI DAŬRE LABORU KONSEKVENCE, ENERGIE, CELKONSCIE, ENTUZIASME, UZANTE KIEL EBLE PLEJ EFIKE LA EBLECOJN KIUJ EKZISTAS ĈIE ĈIRKAU NI."

.MUTH: (NE RESPONDIS)

## RAPORTO DE JEN-RONDO II

Dimanĉon, la 21a de aprilo, okazis granda festo de JEN-Rondo 2 (la Bostona regiono) ĉe Cambridge, Mass. Estis 40 aŭ pli ĉeestantoj ĉe la "nur Esperanto-parolata" afero. Ju pli la posttagmezo daŭris des pli la laŭteco de "nia kara lingvo" estis rimarkata. Verŝajne, la plej kredeblan kialon oni trovas en la (alkoholplena) punĉo farita de Humphrey Tonkin, kies apartamento ujis la kvardekon.

Krom junaj Bostonanoj kaj Harvardanoj, ankaŭ sep vizitantoj de la JEN-Rondo 1 de Novjorko ĝuis la feston. Antaŭ ol mi forgesas, mi nepre devas mencii ke ni havis ankaŭ vizitanton de Norvegujo ĉe ni, samideano Kjell Sellin, kiu bele parolas Esperante.

La programo estis tute neformala; tamen kelkajn programerojn oni kreis meze da la festo. Multaj kantoj estis kantitaj, akompanitaj per gitaro de Joĉjo Knowles. Josefo Blitz bele ludis la du rolojn en la spirita sceno el Hamleto (de Shakespeare). Ĉi tiu teatraĵo ŝajnis al mi perfekte ludita, ne nur ĉar la Esperanto de Blitz estis bonega sed ankaŭ ĉar la teatreco de Blitz ĝustis. Post ĉi tiu okazis "Prezidenta Gazetar-Konferenco." Tiu Esperánta parodio de Kennedy kaj kelkaj raportistoj kaŭzis ridegojn inter la rigardantoj. Johano Kooistra transprenis la Kennedy-an akcenton en Esperanton tre realisme. Sed la granda finalo estis kiam Joĉjo Silverman disdonis pseŭdo-ĵurnalojn kiuj havis, Esperante, ĉeflinioj̃n pri la Konferenco.


Nu! post multaj agoplenaj horoj de ĝojigo kaj je la veno de laceco la festo finiĝis per la manĝado de pico (pizza). Tuj poste, la Novjorkanoj adiaŭis nin kaj ekforiris hejmen. Ni, la junaj esperantistoj de la Bostona regiono, estis tiel lacaj ke ni nur povis diri "Ĝis!!"

— Jim May

* * *

### KORESPONDSERVO DE JEN

Respondeculo pri la korespondservo estas Eugene Calvert, 80 Avenue C, New York 9, N.Y. S-ano Calvert informas ke jam pluraj kontaktoj estiĝis inter korespondemuloj. Skribu al li se vi volas enskribiĝi kiel korespondemulo. Se vi havas sendilon, notu ke per sonbenda korespondado estas treege interesa!



"DIC VIN BENU."

STONE: "MI VOLAS VIDI ESPERANTAN LIBRON EN ĈIU PUBLIKA KAJ UNIVERSITATA BIBLIOTEKO EN USONO. TIUCELE MI VOJAĜAS OFTE KUN MIA EDZO POR KONTAKTI DIVERSAJN BIBLIOTEKOJN KAJ PREZENTI AL ILI ESPERANTO-LIBROJN, PRECIPE EN LA SUD-OKCIDENTAJ STATOJ COLORADO, ARIZONA, NEW MEXICO, WYOMING. MI TRE ESPERAS, KE ALIAJ GESAMIDEANOJ FAROS SAME EN SIAJ RESPEKTIVAJ ŜTATOJ."

GLENNY: (NE RESPONDIS)

POLLOCK: (VIDU RESPONDON AL OKA DEMANDO)

REGAL: (NE RESPONDIS)

RUNSER: (NE RESPONDIS)

SCHULZE: "MIA ĈEFA TASKO VENONTJARE ESTOS INSTIGI INSTRUISTOJN LERNI ESPERANTON KAJ EFEKTIVIGI LA PLANON DONI SUBVENCIOJN AL INSTRUISTOJ POR ĈEESTI LA UEA-KONG. EN LA HAGO KAJ ALIAJ LOKOJ KIEL S-INO BURTZLOFF FAROS ĈIJARE."

POOL: "LOKAJ GRUPOJ UTILAS NUR EN TIUJ LOKOJ, KIE ILI EKZISTAS. ALILOKE, LA LIGO DEVAS AGI REKTE POR AKIRI NOVAJN ESPERANTISTOJN KAJ MEMBROJN. LAŬ MI, LA LIGO DEVAS PRIZORGI LOKAN VARBADON PER LOKAJ KOMUNIKILOJ, CERTIGI LA EKZISTON DE INFORMO PRI ESPERANTO EN LOKAJ BIBLIOTEKOJ, KAJ VENDI LERNILOJN AL LOKAJ BUTIKOJ EN TIUJ LOKOJ KIE MANKAS GRUPO. TAMEN, ĈIO TIO POVAS ATENDI ĜIS NI PURIGOS NIAN PROPRAN DOMON, LAŬ LA MANIEROJ KIUJN MI SKIZIS EN LA ANTAŬAJ RESPONDOJ."

* * * * * * *

## KELKAJ REDAKCIAJ KONKLUDOJ PRI LA ELNA-ELEKTO

FELIĈEGE, ONI RIMARKAS, RIGARDANTE LA LISTON DA KANDIDATOJ, KE LA ELEKTOJ ESTIS BONEGE FARITAJ. LA TRI ĈEFKANDIDATOJ RESPONDIS BONE KAJ PLENE AL NIAJ DEMANDOJ. NUR I EL LA 2 VIC-PREZIDANTAJ KANDIDATOJ RESPONDIS KAJ BEDAŬRINDE NUR 3 EL LA KANDIDATOJ POR LA ELNA ESTRARO RESPONDIS AL LA DEMANDARO.

SUPOZANTE, KE NENIU EL TIUJ 4 NERESPONDINTOJ ESTIS MALSANA, ILIA SILENTO INDIKAS MANKON DA INTERESO PRI JUNULAJ KAJ ELNA-AFEROJ KAJ PRO TIO, NI URGE REKOMENDAS, KE NIAJ MEMBROJ, SUBTENANTOJ, KAJ AMIKOJ NE SUBTENU LA KANDIDATECON DE FRANCIS HELMUTH, WILLIAM GLENNY, JULIE REGAL, KAJ ROBERT RUNSER. MALE (KAJ PLI POZITIVE) ESTUS BONE SE NI SUBTENUS ROAN STONE, ELWYN POLLOCK, CATHERINE SCHULZE, KAJ ENSKRIBIĜA KANDIDATO JONATHAN POOL.

INTER LA RESPONDOJ DE LA PREZIDANTOJ, NI ĜENERALE ŜATAS LA RESPONDOJN DE LA 3 KANDIDATOJ, SED, BEDAŬRINDE, NE POVAS SUBTENI LA EMON DE S-ANO DONEIS AL NE-NEŬTRALISMO, NEGATIVISMO, KAJ KONSERVATISMO. NUR DU LINIOJ EL LA LETERO DE S-ANO DONEIS AL LA SEKRETARIO DE JEN, RICHARD KOLLIN, BONE MONTRAS LA STARPUNKTON NEGATIVAN KAJ ARGUMENTPROVOKAN DE S-ANO DONEIS, "VIA ENKETO DE APRILO 29A ŜAJNAS ESTI SUPERFLUA, ĈAR APEROS SUR LA DORSO DE NIA ELNA BALOTILO LA NECESAJ INFORMOJ PRI LA KANDIDATOJ." MENCIANTE LA PEZAN TASKON DE LA ELNA KANDIDATOJ, S-ANO DONEIS PLUE DIRIS "DO, NI ESTU

TRE DANKEMAJ AL TIUJ KANDIDATOJ..., KAJ NE PLU ŜARĜU ILIN PER LA NECESO RESPONDI AL DETALA ENKETO." "DETALA ENKETO" KONSISTANTA EL PRECIZE DEK DEMANDOJ.

TAŬGAS, KE NI ATENTE STUDU LA KANDIDATAJN RESPONDOJN KAJ ĈI-TIUJN KOMENTOJN, ĈAR NI ESTOS LA POSTEULOJ, KAJ NI DEVAS HEREDI AŬ MOVADON MALFORTAN, DISIĜINTAN KAJ RIDINDAN, AŬ MOVADON FORTE KAJ RAPIDE ANTAŬENMARŜANTAN.

* * * * *

## POR TENADI LA LERNANTON...

ĜIS NUN, GRANDA MANKO EN LA PORLERNANTA ANTAŬENPUŜIGO DE ESPERANTO ESTIS LA MALESTO DE RIMEDOJ PER KIUJ LA ESPERANTA LERNANTO EKSCIOS KIEL UZI SIAN AKIRITAN SCION, EN KAJ EKSTER LA KADRO DE LA ESPERANTA MOVADO. TRE BEDAŬRINDE ESTIS LA OFTA PERDIĜO DE NOVAJ ESP-ISTOJ KIUJ LERNINTE LA LINGVON PERE DE LERNOLIBRO(J) SOLE, NE EC EKSCIIS PRI LA EKZISTADO DE DIVERSAJ ESPERANTAJ ORGANIZAĴOJ, REVUOJ, KC.

TIUN AKRAN PROBLEMON KAJ MULTAJN ALIAJN SOLVAS LA NOVAJ KOMPLETOJ, KIUJN NUN DISVENDAS JEN. LA KOMPLETOJ, ANGLALINGVE, "ESPERANTO KITS," ESTAS LA CERBIDOU DE LA JEN-ESTRARO, KIU PASINTJARE PRIDISKUTIS LA PROBLEMON DE NOVULA FORPERDO PRO MANKO DE SUFIĈE AGADINSTIGAJ SCIIGOJ EN LA ĜISNUNAJ E-LERNOLIBROJ.. KIEL ONI INTENCAS TENADI LA LERNANTON POR LA MOVADO PER ĈI-TIUJ KOMPLETOJ?

LA KOMPLETOJ KONSISTAS EL LA JENAJ EROJ: 1. LA MONDKONATA LERNOLIBRO <u>TEACH YOURSELF ESPERANTO</u>, DE CRESWELL KAJ HARTLEY, 2. LA BONEGA PRONONCDISKO DE <u>LES EDITIONS FRANCAISE</u> KUN LA VOĈOJ DE FLEGO KAJ PEYRONNET (45RPM) 3 LA PLEJ BONFARITA KAJ KOMPLETA ANGLALINGVA VARBILO PRESITA DE EICHOLZ: <u>ESPERANTO: LINGVO INTERNACIA</u> (44 PAĜOJ), 4. LA BONEGA <u>ENGLISH-ESPERANTO VOCABULARY</u> (3,600. ) ELDONITA DE BRITA ESP-A ASOCIO; 5. L2-PAĜA BELEGA TURISTA FALDFOLIO DE ANTVERPENO, BELGIO,; 6. LASTATEMPA SPECIMENO DE OKCIDENT-GERMANA REVUO; 7. INTERNACIA KORESPOND-KARTO (UEA) POR INTERNACIAJ KONTAKTOJ; 8. BELA, KOLORA FALDFOLIO DE KLM: 9. LIBRO-LISTO (ENHAVANTE 325 TITOLOJN TUJ HAVEBLAJ DE LIBRO-SERVO DE JEN (SEN PROPAGANDO); 10. ALIĜILO POR ELNA; 11. ALIĜILO POR JEN; 12. ENKONDUKA KAJ EKSPLIKA LETERO PRI LA KOMPLETO: ONI POVAS EKKOMPRENI, KE LA KOMPLETOJ ESTAS DESEGNATAJ POR KAPTI KAJ LONGTEMPE TENADI LA INTERESON DE LA LERNANTO, INSTIGANTE AL PLI PROFUNDA SINENMETO EN NIAN AFERON.

SENDUBE ALLOGA ESTAS LA NUNTEMPECO DE LA MATERIALO. TIU NUNTEMPECO ESTAS PSIKOLOGIE GRAVA POR KE ESPERANTO APERU LAŬMODA, NOVSTILA AFERO. KELKFOJE LA ĜIS NUN UZITAJ LERNOLIBROJ DONIS PRESKAŬ PRATEMPAN BILDON DE LA MONDO KAJ DE LA ESP-A MOVADO. UZANTO DE LA NOVAJ KOMPLETOJ RICEVOS PLI ĜUSTAN, PLI AKTUALAN BILDON. SURBAZE DE TIU, ONI POVUS FORMI ĜUSTAN OPINION DE LA LINGVO KAJ ĜIA DISVASTIĜO.

LA KOMPLETO ENPAKIĜAS EN KARTONAJN SKATOLOJN SUR KIES

LA KOMPLETO ENPAKIĜAS EN KARTONAJN SKATOLOJN SUR KIES ANTAŬAĴO APERAS MODERNSTILA DESEGNAĴO ENHAVANTA VERDAN STELON KAJ GLOBON. BELE OKULFRAPA KAJ INTERESPROVOKA ĜI ESTAS.

TUJ VIDEBLA ESTAS LA GRAVECO DE ĈI TIU ANTAŬENPAŜO. LA KOMPLETOJ, KIUJ DONOS BONAN FREŜDATAN SCION KAJ BILDON DE ESPERANTO KAJ ĜIA MOVADO, ESTAS PREPARATAJ KAJ DISVENDATAJ DE JEN. LA TUTA KOSTO SE VI AĈETUS ĈIUJN AĴOJN UNUOPE ESTUS $4.50. LA KOSTO POR ESPERANTISTOJ POR UZI ĜIN KIEL VARBILO ESTAS NUR $3.25..... 50¢ PLI OL LA TEACH YOURSELF ESPERANTO SOLE!!!

* * * * * *

## LA GRANDA ŜTUPARO

OKAZIS SUBITE. AŬ, PLI BONE ESPRIMITE, MALOKAZIS. LA HOMO SIN TROVIS STARANTE SUR MALGRANDA, GRIZA, CIRKLO DE GRUNDO, TUTE ĈIRKAŬITA DE RONDA, GRANDA, ALTEGA ŜTUPARO. ESTIS, SENDUBE, ALMENAŬ CENT MIL ŜTUPOJ, KIUJ ESTIS SAMCENTRAJ CIRKLOJ, ĈIRKAŬ LI. TIO ĈI DEVIS ESTI REVAĈO, KAŬZITA DE LIA MALSANO. LI PINĈIS LA BRAKON POR VEKIĜI. OKAZIS NENIO. LI VOLIS ALVOKI FLEGISTINON, SED MANKIS SONORILO. ESTIS TUTSILENTE. LI LAŬTVOĈE VOKIS LA FLEGISTINON; POSTE, LA KURACISTON. NE RESPONDIS EĈ EĤO. EBLE LI ESTIS JAM MORTA AU PRESKAŬ MORTA. EBLE LA ŜTUPARO ALKONDUKIS AL LA ĈIELO. SED LA HOMO ĈIAM KREDIS, KE TIU ESTUS ORA ŜTUPETARO ANSTATAŬ GRIZA, STONA ŜTUPARO. LI RIGARDIS REKTE SUPREN. LI VIDIS NENIAN BRILON, NEK LUMON, NUR HELAN GRIZON. SENTANTE SIN TUTE SOLA, LI VOKIS DION. NENIU RESPONDIS. EKŜVITANTE, LI VOKIS LA DIABLON. TUTA SILENTO ANKORAŬ. LI FERMIS LA OKULOJN KAJ REPINĈIS LA BRAKON. NE, LI RESTIS SAMLOKE.

KION LI FARU? LA HOMO NE VOLIS ĈIAM RESTI TIE. SED SE LI DEZIRUS FORIRI, LI NUR POVUS IRI SUPREN. KAJ SE LI GRIMPUS NUR DEK KVIN EL LA MULTEGO DA ŜTUPOJ, LI CERTE SUFERUS TERURAN KORATAKON, KIEL PLURFOJE ANTAŬE. PLI MALBONE, NE EKZISTIS IU AJN BALUSTRO AU MANTENILO. SED ESTIS STRANGA AFERO: LI SPIRIS BONE, KAJ LA BRUST-DOLORON, KIUN LI ESTIS SUFERINTA PLURAJN TAGOJN, LI NE PLU HAVIS. TAMEN, KIU SCIUS, KIO POVAS OKAZI DUM LA SUPRENIRO? TREME, LI HEZITIS. JES, LI DEVIS SUPRENMARŜI. LA PLEJ MALBONA REZULTO ESTUS LA MORTO, KAJ EBLE LI JAM ESTIS MORTINTA. FARINTE DECIDON, LI KOMENCIS LA GRIMPADON.

TIMEME, LI MARŜIS TRE MALRAPIDE. ĈU LI KOMENCIS HAVI DOLORON? NE, NENIAN. IOMETE KURAĜIĜINTE, LI PLIRAPIDIGIS LA GRIMPADON. ANKORAŬ, NENIAN DOLORON. LI EKMARŜIS ANKORAŬ PLI RAPIDE. LI NE HAVIS KURAĜON TURNI SIN KAJ RIGARDI MALSUPREN; SED SAMTEMPE LI NE KREDIS, KE LI ATINGOS LA SUPRON, KIUN LI TUTE NE POVIS VIDI. LI GRIMPIS, GRIMPADIS, PERDANTE TUTAN SENTON DE TEMPO. ALIA NEORDINARA AFERO: NE NUR LI NE SENTIS DOLORON, NE NUR LI ŜAJNIS SPIRI FACILE, LI ANKAŬ NE LACIĜIS. FAKTE, LI MALLACIĜIS. LI SENTIS KRESKANTAN FORTON. SED LA SUPRO RESTIS TRE, TRE MALPROKSIME. LA HOMO NE KOMPRENIS LA AFERON. LI NUR POVIS KAJ DEVIS — JES, DEVIS — SUPRENMARŜADI.

KIOM DA ŜTUPOJ LI GRIMPIS? ĈU MIL, DEK MIL, KVARDEK MIL? LI NE SCIIS. SED LIA FORTO KRESKADIS, KAJ EKKRESKIS ANKAŬ PROFUNDA KAJ AGRABLEGA PACO. FINE LI KREDIS — ĈU POVAS VERE ESTI? — KE LI VIDU LA SUPRON. KIA ĜI

ESTIS? BELA, PLAĈA, KOMFORTA, KIEL LIA HEJMO. KIE NUN ESTIS TIU HEJMO? LI DAŬRIGIS SIAN SUPRENMARŜADON. JES, LA SUPRO ŜAJNIS PLIPROKSIMIĜI. TRE BALDAŬ LI ESTOS TIE. LI APENAŬ POVIS KREDI; SED JES, LI KREDIS. ĈAR JEN ĜI ESTIS! LA HOMO ESTIS ĈE LA GRANDA PORDEGO. ĜI ESTIS MALFERMITA. LI RIGARDIS TRANSEN. LI NEK VIDIS NEK AŬDIS IUN; SED LI SCIIS, KE LI NE ESTAS SOLA. ĜI ESTIS PLI BELA, PLI AGRABLA, PLI PLAĈA, PLI KOMFORTA, KAJ PLI PACA OL IO AJN, KIUN LI ANTAŬE VIDIS. FELIĈEGE RIDETANTE, LI ENIRIS.

— ELLEN A. LEWIS

* * * * * *

## VORTARETO APROBINDA KAJ NEPRE ADOPTINDA (VANA)

(NOTU: DUM LA PASINTA MONATO, ONI DISKUTIS EN KUNVENO DE IU NOV-JORKREGIONA E-GRUPO LA PROBLEMON DE NEOLOGISMOJ KAJ BEZONO AŬ NEBEZONO DE TIES UZO EN DIVERSAJ CIRKONSTANCOJ. ĈAR FAKTE NIN FORTE IMPRESIS LA ARGUMENTOJN DE SAMIDEANO D-RO JULIUS BALBIN, NI PROPONAS URĜE BEZONATAN VORTARETON SLANGAN POR GEJUNULOJ.)

FLIPI — ĜUEGI, ŜATEGI. EKZE: TRE MULTE ŜI FLIPIS AŬDANTE LA BONAJN INFORMOJN.

GRUVA — ŜVINGA (VIDU MALSUPREN), SED SEN NUANCO DE MOVADO. EKZE: LA JEN-BULTENO ESTAS GRUVA, TUTE NE ANTEDILUVA.

HIPA — KOMPRENEMA, LERTA PRI SPECIFA AFERO. HIPULO — ULO, KIU ESTAS HIPA. EKZE: TIU ARTISTO ESTAS HIPEGA PRI KOLORO KAJ FORMO.

KAT(IN)O — HIPULO, PERSONO, HOMO. RIM: PRO EKZISTO DE VASTA SIGNIFARO, UZO DE ĈI-TIU VORTO ESTAS EVITINDA.

PADO — LOĜEJO, SPECIFE DE HIPULO. EKZE: POST DISKUTADO, ĈIU ENPADIĜIS.

SCENUMI — APERI EN IU LOKO. EKZE: KIAM LI AŬDIS, KE LI ESTIS SERĈATA DE LA POLICISTARO, LI RAPIDE MALSCENUMIS.

ŜAKOPI — EKSTERLEĜE KUNMALSAMSEKSULE LOĜI, KUNPADANIĜI. EKZE: ŜAKOPADO ESTAS LIA PLEJ ĜUATA ŜATOKUPO.

ŜVINGA — BONEGA, LAŬ OPINIO DE HIPULO. RIM: MOVADNUANCON ĈI-TIU VORTO ENHAVAS. EKZE: LA JEN-KONGRESO NEPRE ŜVINGOS.

THEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSARE
READYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKI
TSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADY
THEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSARE
READYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKI
TSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADY
THEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSAREREADYTHEKITSARE

## THE ESPERANTO SELF-INSTRUCTION KITS ARE HERE!

CONTENTS:

| | |
|---|---|
| TEACH YOURSELF ESPERANTO (CRESSWELL & HARTELY) | $2.75 |
| ESPERANTO PRONUNCIATION RECORD, 45 RPM (FLEGO) | $1.25 |
| ESPERANTO: LINGVO INTERNACIA, 44 P. (EICHHOLZ) | $ .35 |
| ENGLISH-ESPERANTO VOCABULARY, 3,600 WORDS (BEA) | $ .05 |
| KLM TRAVEL FOLDER (IN ESPERANTO) | |
| 12-PAGE BEAUTIFUL TOURIST FOLDER FROM ANTWERP | |
| RECENT COPY OF "OKCIDENT-GERMANA REVUO" | |
| INTERNATIONAL CORRESPONDENCE BLANK | |
| BOOK LIST (325 TITLES, AVAILABLE IMMEDIATELY IN U.S.) | |
| MEMBERSHIP BLANK FOR BOTH ELNA AND JEN | |
| INSTRUCTION SHEET FOR USE OF KIT | |

TOTAL VALUE .. $4.40

YOURS NOW FOR ONLY $3.25!!

SEND FOR YOURS TODAY! WRITE TO:

JEN
30 AVENUE B
NEW YORK 9, N.Y.